

LINGVAJ MALFACILAĴOJ
de la KUBAJ LERNANTOJ de ESPERANTO

Alberto García Fumero

1. Enkonduko.

La ĉi-suba artikolo celas priskribi kelkajn el la malfacilaĵoj, kiujn frontas gelernantoj je la unuaj niveloj, antaŭ ĉio novkomencantoj. Ĉio priskribata rilatas al kubaj gelernantoj de la internacia lingvo, sed la fenomenoj observataj rilatas grandparte ĝenerale al hispanlingvanoj.

2. Fonologio.

El la 28 fonemoj de la lingvo Esperanto estas kelkaj malfacile prononceblaj de kubanoj, eĉ de la plej kleraj. Ne la vokaloj, sed la konsonantoj estigas la problemojn. La hispana vokalsistemo estas kvinmembra k tute kongrua kun tiu de E-o. La prononcmalmaniero de vokaloj en la hispana alportas neniun signifan informon, do ne estas problemo. Tamen, se temas pri konsonantoj, la afero estas alia.

En la nuntempa hispana lingvo la du morfemoj /b/, /v/ rilatas al la unusola fonemo /b/. Ĉar nuntempe oni kutime ne diferencas la fonemon /b/ disde /v/, tiun ĉi sintenon oni tro facile enŝovas en la prononcadon esperantan. Cetere, tiu ĉi lingva kutimo restas neelĉerpebla fonto de kapdoloroj por instruisto, ĉar la lernejoj estas devigataj memori tedajn gramatikajn regulojn pri la ĝusta uzado de la litero b kaj v.

La fonemon ʒ (ĵ), ne ekzistantan en la hispana, kelkaj el ni tendencas prononci preskaŭ kiel tʃ (ĉ) dum ĉiutaga parolado. Eĉ pli malfacile prononcebla de kubanoj estas la fonemo dʒ (ĝ).

La fonemon reprezentatan en E-o per z oni tendencas prononci kiel la esperantan s. Okazas ke la plimulto el la latinamerikanoj kutime ne diferencas inter la fonemoj reprezentataj per la morfemoj hispanaj /s/, /c/,

/z/. Tio konsistigas ne venkeblan lingvan kutimon k alian fonton de kapdoloroj. Do, kiam novulo komencas la lernadon de la internacia lingvo, li estas devigata unue agnoski, ke estas diferenco k due ellerni novan fonemon, ĉar la hispana prononcadado de la morfemo z tute malsamas kun tiu de la esperanta z.

La fonemo ʃ (ŝ) ankau ne apartenas al la sistemo hispana; la plej ofta surrogato elektita de la lernantoj estas tʃ (ĉ). Pro voĉasimilo, kiel tre bone rimarkas inter aliaj WELLS, ĉe ni estas tre kutime prononci "agvo" (akvo), "ogdek" (okdek) ktp. Ankau la komenca kombino kv estas malfacila: la vorto "kvartalo" estas ofte prononcata "kūartalo". Aliaj kombinoj kiel ekz. gv kaj sc ne estas facile prononceblaj de lernantoj je la unua nivelo: ili tendencas prononci ĉi tiujn kombinojn kiel respektive /v/ kaj /s/.

La fina -m ne ĉiam bone diferenciĝas disde la fina -n, nome en paroj kiel -ion au -iom.

3. Sintakso.

La hispana lingvo samkiel la esperanta apartenas al la tipo SVO lau la klasifiko de GREENBERG. Tio signifas, ke la plej ofta sintakso hispana postulas, ke la objekto troviĝu post la verbo transitiva. Tiu ĉi vortordo estas modifita nur kaze de koscia serĉado de stilefeto ekz. en poezio. Kvankam ni koscias pri la fakto, ke en la internacia lingvo la vortordo estas relative libera dank' al tio, ke la objekton oni signas per -n, nur malofte ni profitas la avantaĝon. Eleganta esperanta parolado, kun (el nia vidpunkto) inversa vortordo devigas nin ĝisatendi la finon de frazo por ĝuste kompreni. Ĉar intuicie (pro la propraj lingvaj kutimoj) la lernanto emas konsideri "ĉion, kio troviĝas post la verbo transitiva" kiel komplementon, do entute klarigita afero, li ne sentas la bezonon ĝin rimarki.

Ĉar la hispana plenmane uzas prepoziciojn la lernanto ĉiam restos pli komforta ĉe ili ol ĉe la objektomontra morfemo -n. Tio, tamen, estigas problemon: ne estas rekta interrespondeco unu-al-unu inter la hispanaj k la esperantaj prepozicioj. Kiel rimarkas DIEGO en sia bonega lernolibro, hispanparolantoj devas alkitimiĝi al tio, ke *ponerse un anillo en la dedo* estas surmeti ringon 'sur' la fingro; tiu, kiu *camina por la calle* fakte marŝas 'sur' la

strato, *libro escrito por mi* estas libro verkita 'de' mi.

Speciale malfacila por la lernanto estas la esperanta 'ke'; la hispana *que* prononcata /ke/) senprobleme tradukiĝas kiel 'ke', sed en frazoj kiel *el hombre que habla* – la homo kiu parolas, la lernantoj tendencas traduki la hispanan *que* per ke. La sama problemo prezentiĝas ĉe la ĝusta uzado de tia kaj kia; frazoj kiel *te prefiero como eres* – mi preferas vin tia, kia vi estas, ofte tradukiĝas kiel "mi preferas vin kiel vi estas".

La demando 'ĉu' ne havas ekvivalenton en la hispana; la lernantoj tendencas forgesi pri ĝi. En la hispana oni preferas esprimi la demandon pri vero au valido de aserto per la ŝanĝo de intonacio

4. Morfologio.

La kutima pedagogio klasigas la vortojn esperantajn en radikoj, sufiksoj, prefiksoj ktp. El pedagogia vidpunkto tiu ĉi klasado estas valora k konforma al la strukturoj k kutimoj de la hispana. Tamen, kiam novulo staras antaŭ vortoj kiel "indo", "ade", "praa", troveblaj sur la paĝoj de ĵurnaloj k revuoj, tio iom ŝokas, ĉar la hispana ne konas memstaraj sufiksoj. Okazas, ke dum la instruado la lernanto (ne temas ĉi tie pri tiuj, kiuj serioze k sisteme studas k analizas la lingvon) tre malofte kaptas la esencon de la esperanta vortfarado. Tio ekestas, ĉar E-o konsistas el memstaraj vortoj (Zamenhof, Esperanta Krestomatio), ke ne temas en tiuj kazoj pri derivado, sed pri kunmetado. Neniam oni insistas sufiĉe pri tiu ĉi punkto. Ĉar la lernanto emas konsideri la "sufiksojn" esperantajn kiel verajn sufiksojn, tio malhelpas lin akiri flekseblecon.

Ĉar oni tendencas respuguli la lingvajn kutimojn, estas tre kutime en la komenco, preferi "mi estas parolanta" anstataŭ la pli simpla "mi parolas". Kompreneble tio ne estas peko, sed iom balastigas la paroladon.

Ĉar fremda al niaj lingvaj kutimoj ni rigardas stranga la regulon estas + a-sintagmo = as-sintagmo; ankau preskau neniam strukturoj kiel "preferintus" estas uzataj de niaj lernantoj. Oni tendencas respuguli en la uzado de la internacia la uzadon de la hispanaj helpverboj *ser* kaj *estar* – esti.

Aparta esperanta esprimrimedo el verbo + "sufikso" por esprimi nuancon

ŝokas la novulon; nur post longa tempo la lernanto al kutimiĝas al verbaj formoj kiel "moveti".

5. Falsaj amikoj.

Por la lernanto ekzistas multaj falsaj amikoj; tiuj estas vortojerarigaj pro simileco al hispanaj vortoj, sed kun malsama signifo; ekz. oni ofte uzas la vorton "kontroli" kun la intenco esprimi "mastrumi". Jen bukedo: kulo, plato, hundo, ve, pozo, kiuj asociiĝas kun la hispanaj vortoj signifantaj respektive postaĵo, telero, mi sinkas, iru vi, puto. La instruisto devas esti atenta al tio, ke la lernanto ne memoru la neĝustan signifon.

6. Konkludoj.

Estus konveneble, se la instruistoj iom pli insiste pritraktus la temon rilatan al la esperanta vortfarado (kompreneble ne dum la unuaj lekcioj). Tio estas afero pli grava ol la eventuala misprononco de iu ajn fonemo. La uzo de la morfemo –n por signi la komplementon postulas de la lernanto konscian scion pri la afero; tio signifas, ke almenau elementa, intuicia sento pri tio, kio konsistigas komplementon, devas esti celo de instruisto jam ekde la unuaj paŝoj.

Literaturo.

Wells, John, Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto, UEA, 1977.

De Diego, Fernando, Nuevo método de Esperanto para clases y autodidactas, Heroldo de Esperanto, 1982.

Waringhien, Gaston kaj Kalocsay, Kalman, Plena Analiza Gramatiko de Esperanto.

Adreso de la aŭtoro:

Alberto García Fumero

Teknika Lernejo pri Manĝaĵoj "Ejército Rebelde"

Persona adreso:

Calle 26 # 3313 entre 33 y 35 Playa

C 11300 Ciudad de la Habana

CUBA.